La kutima kunveno je Sankt Nikolao okazis en Homburgo en najbara Sarlando. Ĉeestis deko da francoj el la departementoj 51, 57, 94.

La ĉefa okazintaĵo konsistis el prelego de D.rino Sabine FIEDLER pri frazeologio. Tiu juna instruistino pri la angla en Leipzig pristudis esperantan frazeologiaĵojn. Ŝia libro, en la germana, kompilas la specife esperantajjn esprimojn troviĝantajn en literaturaĵoj, revuoj kaj paroladoj inter 1994 kaj 1999.

Konstatindas ke Esperanto funkcias kiel etna


## BAVELA KALENDARO

En la Bavela kalendaro antaŭvidatas Esperanto-tago en Konstanz ĉe la lago, ĉu la 27/ 04 aŭ la 11/ 05/ 2002. Per meso en la katedralo, la organizantoj intencas pruvi la multifacetan vizaĝon de Esperanto.

## NIA REGION-KALENDARO

Tie ankaŭ okazis komitatkunsido de Espéranto France-Est. Notindas :

- partopreno en SAT-Amikara kunveno dum Pasko en VIGY (57)-la grupo de Thionville LKK-as - ,
- organizado de UFE-kunveno en Strasburgo dum Pentekosto,
- aŭtune regiona staĝo en Nancio
- eldono de KD en Esperanto fare de la kantisto Morice Benin.



lingvo, ĉar ĝi ne nur prunteprenas de fremdaj lingvoj esprimojn kaj proverbojn, sed kreas siajn proprajn. (Vidu sekvantan paĝon !)

Lima Serejo Edmilson kaj la loka organizanto aranĝis brazilan vesperon per lumbildoj pri la urbo de la estonta UK, per landa trinkaĵo kaj muziko.

Diversnivelaĵoj kursoj arigis multajn lernemulojn. Madeleine de Zilah prezentis vastan libroservon. Jean-Marie Barnouin oficis en angulo de la enirejo, proponante diversajn ludojn. Albrecht Kronenberger arigis preĝemulojn en la kapelo de la kunvenejo dum meso celebranta tempon de atendo kaj de espero.



Sabine Fiedler / ahub

## KIO ESTAS FRAZELOGIO ?

Estas pristudo de vorttrezoro el kiu oni ĉerpas esprimojn por trafe klarigi, bildigi sian penson, estas trezoro kiu daŭre vastiĝas pro spontana kreado. Temas pri parolturnoj, vortludoj, proverboj, « flugilhavaj » vortoj specifaj en ĉiu lingvo kiujn oni inde memorigas por partopreni en la uzanta lingvokomuno.

Ni citu : vera amo, arbara mortado, interkona vespero ( kial ne ... mateno ? ), ĝisi kaj kisi, vole nevole, levi la ĉapelon, ŝiri la harojn, ne ŝovu la nazon en ..., ŝatata ĉevaleto, stari sur propraj kruroj, turni la dorson, fina « velko », ...

Sabine Fiedler (\*) raportis pri enketo ĉe pli ol 500 esperantistoj, ankaŭ el aziaj landoj, por scii kiel en esperantujo oni komprenas centon da esprimoj kaj proverboj.

Eŭropaj partoprenantoj en tiu pridemandado, plej trafe respondintaj, plie pruvis ke Esperanto estas lingvo de tiu kontinento kaj ke ekzistas vasta samkultura bazo. Ŝi notis ke la esperantlingvaj verkistoj konscias pri ilia internacia legantaro kaj pri ofte klarigendaj esprimoj. Tio okazas per kunteksto, ofte per piedpaĝnoto.

## UZADO en ESPERANTUJO

Tiu pristudo ampleksis la parolan kaj skriban tekstojn.

Dum kvin jaroj, ŝi ĉeestis multajn kongresojn por kapti frazeologiaĵojn « sur la lipoj » de la parolantoj. Tiu sporta vortludado aperas regule en titoloj de artikoloj por tikli la scivolemon kaj por legstimuli la abonanton. Ŝi regule tralegis la internaciajn revuojn kiel *Monato*, *Fonto*, *Eventoj*, *El popola Ĉinio*, *La Gazeto*, ...

Sed la plej gravan fonton de esprimoj, ŝi ja

trovis en esperanta beleto. Tie la verkistoj plene uzas spritajn esprimojn por pinte resumi, troigi, ironizi, intelekte ĝuigi.

## VALORIGA KONSTATO

Per tiu pristudo okulfrapas la valoro de nia lingvo. Ĝia fleksebleco, adaptiĝo superas tiujn de etnaj lingvoj. Tio lume rimarkeblas en la proverboj per la rimo, la ritmo, la paralelaĵoj. Ĉu ni sufiĉe konigas la plej uzatajn proverbojn ? Elektindas inter la 2630 citaĵoj de la Zamenhofa « Proverbaro esperanta ».

Ofte lingvistoj riproĉas al Esperanto sian « senkulturecon ». Ankaŭ la esperanta frazeologio forbalaas tiun stretspiritan argumenton. Nia esprimtrezoro brilas pro la taŭgeco de la planlingvo. Ties valoro ankoraŭ kreskas pro la amplekso de multaj kulturoj kiuj riĉigas la tuton per siaj kontribuajoj.

Esperanto jam posedas vastan kulturecan heredaĵon.

A. Hubert

(\*) « Plansprache und Phraseologie » : D.rino Sabine Fiedler. Esperanta eldono baldaŭ sekvos.  
Eldoneja retadreso < 101622.27@compuserve.com >

## PRI FLEKSEBLECO DE LA LINGVO

El la prelegmaterialo de S. Fiedler.

*Meto de objekto antaŭ la verbo*

Propran ĝibon neniu vidas.

Urson evitu, bopatrino ne incitu.

*Postmeto de atributo*

Barelo malplena sonas plej laŭte.

Kapo majesta sed cerbo modesta.

*Meto de verbo antaŭ la subjekton*

Ŝirigis fadeno sur la bobeno.

Ne defendas oro kontraŭ doloro.

*Antaŭmeto de cirkonstanca komplemento*

Ĉe tablo malplena babilo ne fluas.

Per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro.

*Disigo de verbaj partoj*

Pri gustoj oni disputi ne devas.

Kiu devas, tiu elekti ne povas.

*Ŝanĝo de gramatikaj strukturoj*

Venas proverbo el popola la cerbo.

Ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta.

*Kiasmo*

Ne bela estas amata, sed amata estas bela.

Pli bona homo sen mono, ol mono sen homo.



Kiel vi komprenas : Plendu ĉe la kuirejo ?

Kiel vi komprenas : Blanka mensogo ?

Ĉu « plendu mallaŭte » aŭ « plendu ĉe la taŭga instanco » ?

Ĉu « travidebla » aŭ « senkonsekvenca » mensogo ?

# IF

INTERNACIA  
FESTIVALO

## LA 18-a INTERNACIA FESTIVALO MAGDEBURG 27.12.2001 - 3.1. 2002 UNU MONDO - KVIN KONTINENTOJ

Kiel ĉiam tre riĉa, ĉi-jara 18-a IF okazis unuafoje en nova federacia lando Saksio-Anhaltio. Ĝi estis bona elekto. Ni povis rimarki agrablajn diferencojn. Afabla akcepto de la direktoro, kiu eĉ bonvenigis nin esperante, feste dekoraciita enirhalo, koridoroj kaj ĉambroj atestis pri tio. Partoprenis ĉirkaŭ 200 gesamideanoj inter kiuj pluraj novuloj. Al ili la Festivalo plaĉis ekde la unua partopreno. Iuj jam senhezite aliĝis al la sekvonta.

Post vespermanĝo kaj bonvenigo de la organizanto Hans-Dieter Platz - la motoro de IF - okazis interkona vespero, kiun per spritaĵoj animis la konata magiisto Trixini. Mikaelo Bronŝtejn el Rusio gitaris kaj kantigis la ĉeestantojn. Ekestis agrabla etoso, kiu postdaŭris en la Knajpo. Parolado, ŝercoj, kantoj aŭdiĝis ĝis malfruaj nokt-horoj.

Ni restadis ne malproksime de la urbocentro, do ofte eblis promenadi kaj aĉetumi. Dum plurfojaj urbaj promenoj, gviditaj de spertaj magdeburganoj, ni konatiĝis kun tiu tre bela urbo kaj ĝiaj vidindaĵoj. Interesa estis vizito en Guericke-muzeo, dediĉita al Otto von Guericke, plurfaceta homo plej konata kiel sciencisto. Post detala klarigo de lia sukcesplena vivo kaj liaj meritoj por la scienco, ni provis surloke kelkajn eksperimentojn.

La programo, kiel kutime tre variis kaj abundis. Malfacile eblas elekti el tiom da interesaj proponoj. La kadra temo UNU MONDO - KVIN KONTINENTOJ estis bone plenumita. El ĉiuj kontinentoj ni ĝuis ion admirindan. Travivaĵoj el Afriko, lumbildoj el Aŭstralio, el Sudamerikaj Venezuelo kaj Brazilo, el Israelo kaj Groenlando, El Azio ni gustumis uzbekan manĝon Manti. Arto estis prezentita el fora Dagestano. Per grandaj afiŝoj pri Fortalezo en la enirhalo, per lingvokurseto pri portugala lingvo kaj per prelego pri Brazilo ni estis varbataj por la venonta UK, kiu okazos somere en Fortalezo.

Ne mankis poemoj, kantoj eĉ religiaj, danckursoj, origami, Jumeiho terapio kaj gimnastiko, kvizo, konkurso por legemuloj, bakkurso, trezorserĉado, paroliga kurso, tablo-tenisa konkurso ktp. Ne eblis ĉeesti diversajn prelegojn kiuj okazis samtempe en malsamaj salonoj de la konstruaĵo. Bone ankaŭ funkciis libroservo kaj infan-prizorgo.

Multaj fakaj prelegoj, kiuj rilatis al la ĉeftemo estis prezentitaj fare de kompetentaj prelegantoj. Ne

mankis prelego pri aktuala temo de la 11-a de septembro. Ekestis viglaj diskutoj kaj interŝanĝoj de opinioj, kiuj pliriĉigis kaj kompletigis la koncerajn temojn.

Aparte menciinda estas prelego pri tutmondiĝo, laborgrupo pri interkultura kompreniĝo en praktiko kaj seminario pri Esperanto-instruado kun fervora partopreno de la ĉeestantoj. Tre valoraj estis prelegoj rilatantaj al komputilado.

Ĉar, ekde la 1-a de januaro 2002, okazis la transiro al eŭropa monunujo euro, multaj interŝanĝis, admiris kaj komparis euromonerojn de diversaj landoj. Cirkulis euroj germanaj, francaj, belgaj, nederlandaj kaj aŭstraj. Krome ankaŭ oraj metalaj dolaroj de Tom el Usono. Por ni, Esperantistoj, tiu



euro-evento estas tre bonvena kaj konvena ĉar kutime ni multe vojaĝadas. Feliĉe, ekde nun ni ne bezonos ŝanĝi monon en Euro-eŭropo.

Magia vespero kun Trixini plensukcesis. Ĉi-foje li rilatigis sian prezenton al la aventuroj de Harry Potter, kiujn preskaŭ ĉiuj infanoj jam konis, ĉar ĝi ege populariĝis lastatempe. Trixini, magie vestita, surhavis T-ĉemizon kun emblemo de la lernejo Hogward. Li ofte surprizadis infanojn per aperado de bonbonoj malantaŭ iliaj oreloj.

Ne mankis trukfotisto, kiu multobligis iujn ĉeestantojn en diversaj kaj amuzaj pozicioj.

Dum la folkloro dancvespero aŭdiĝis popolkantoj eĉ tahitiaj. Ni dancis propra-fantazie. Ankaŭ dum la novjara dancvespero ni bone dancis kaj agrable amuziĝis.

Ne mankis surprizo de HDP. Ĉi foje ni ricevis esperantan IF-kantareton. Novulojn li bonvenigis per glaso da ŝaŭmvino. En restoracio, dum la ekskursita tagmanĝo, ni estis regalitaj per terpoma likvoro, cetere bongusta.

La dimanĉa tuttaga ekskurso gvidis nin je 90 kilometra distanco al la urbo Lutherstadt Wittenberg, kie en la 16-a jarcento agadis la konata reformisto Martin Luther. Ni trarigardis preĝejon, bonguste tagmanĝis, vizitis malgrandan presejon kaj revenvoje ni haltis por admiri fasadon de renovigita gimnazio, kolorpentrita laŭ ekstravaganca pentris-



to Friedensreich Hundertwasser, kiu inspiriĝis el infandeseĝnaĵoj. Ĝi en neĝkovrita pejzaĝo aspektis fabele bela.

La junuldomo, kie ni restadis estis renovigita, la ĉambroj estis komfortaj, la manĝoj abundis kaj bongustis. Ĉefe la tablo de la silvestra bufedo estis tre bele aranĝita kaj la enhavo unuavide allogis. Dum la balo ni agrable babilis kaj dancis. Novjaraj kisoj, ridetoj, ĉirkaŭbrakoj, tintadoj kaj reciprokaj bondeziroj abundis kaj ŝaŭmvino fluis freŝigante niajn gorĝojn.

Post abunda brunĉado la novjara promeno en frosta vintro gvidis nin laŭ la rivero Elbo kaj survoje ni ĝuis neĝbulajn amuzojn.

Dum vesperaj programoj ni estis



### Tabloludoj dum IF

*Graĵina Opulskiene el Litovio jam de kelkaj jaroj partoprenas tiujn jarfinajn semajnojn. Ŝi ofte deĵoras ĉe la Knajpo sed ankaŭ*

*ŝatas la societajn ludojn, kiujn ŝi nomas ĉi-tie "tabloludojn". Ŝi volonte rakontas iom pri tiu grava parto de IF.*

regalitaj per magiulado de Trixini, koncerto de profesia kantistino Elena Puĥova, gitar-koncerto kun poemoj de Mikaelo Bronŝtejn kaj per aliaj interesaj humoraĵoj. Post ĉiu prezento sekvis kutima knajpumado ĝis malfruaj horoj. La Knajpon ĉi-foje prizorgis, ĉiam afable, niaj rusaj geamikoj kaj Graĵina el Litovio. Ĉiutage regis gaja etoŝo. Iuj kartludis, aliaj kantis au ŝercis kaj ridegis.

Denove ni akiris novajn neforgeseblajn spertojn kaj travivaĵojn. La etoso estis dum la tuta semajno kiel kutime tre amika. En Internacia Festivalo bone sentiĝas ke Esperanto estas la ĝusta solvo

por egaleca interkompreniĝo kaj facila komunikado. Oni multe lernas de aliaj. Ni havis la impreson, ke la fino alvenis tro rapide. Tempo flugis, jen venis la lasta, internacia vespero kun bunta programo. Kun intereso ni spektis ĵongladon, kanton, skeĉojn, akordionan muzikon, rezultojn de la tenisa konkurso kaj aliajn amuziĝojn. La sekvan tagon plej multaj forvojaĝis al siaj hejmoj.

Sed por ni la IF ankoraŭ ne finiĝis. Estis ebleco partopreni la plilongigan tagon. Ĝi estis interesa kaj ne tiom programe ŝarĝita. Okazis nur unu lumbilda prezento matene. Posttagmeze estis du programoj inter la paŭzoj. Restis eĉ iom da tempo por

butikumi en apuda urbocentra magazeno. Post la prelego pri Puŝkin ni eĉ gustumis bongustan puŝkin likvoron. Prelego kaj projekciado de lumbildoj el Groenlando kaj el ekzotika Venezuelo vekis intereson kaj admiron de aŭskultantoj.

Tre agrabla kaj festeca estis la vespermanĝo Racleto-fromaĝo kun franca ruĝa vino kaj ĉeĥaj kuketoj. La kantoj de Mikaelo Bronŝtejn kaj tiuj de la kantareto gajigis tiun bonan, amikan rondon ĝis malfrua nokto. Ni ĉiuj travivis eksterordinare belan vesperon.

Dum Internacia Festivalo oni ĉiam konatiĝas kun novaj amikoj, interparolas kaj amuziĝas kun malnovaj kaj kune ĝuas internacian etoson. IF estas tre interesa, lerniga, kontaktiga amuza kaj tamen serioza aranĝo.

Ne manku en la venonta 19-a IF! Vi sentos vin reĝe, ĉar unuafoje ni festos en iama akvokastelo Borken, kiu troviĝas en okcidenta Vestfalio, proksime al la nederlanda limo. Ne hezitu, jam 80 partoprenantoj aliĝis surloke al 19-a IF. Ĉu ankaŭ vi?

Liba Gabalda

vivo en Knajpo. Ankaŭ dum tago oni ofte vidas infanojn kaj plenkreskulojn ludantajn diversdajn tabloludojn. Sed vera tempo por ludemuloj venas nur post vespera programo, do post la dudekdua horo.

Jam dum multaj jaroj ekzistas "rondo de Nora" por ludemuloj. Nora de Frankfurto/Main kunportas multajn ludojn, en IFejo elektas iun trankvilan lokon kaj ĉiuvespere partoprenantoj de festivalo ludas

Temas pri tabloludoj kiuj iom post iom fariĝas grava parto de IFoj kaj precipe grava eco de nokta



almenaŭ ĝis la dua horo matene: “Skrablon”, “Erinacon kaj leporon”, “Trion“ kaj aliajn ludojn kie oni devas aŭ esti atentaj, aŭ bone kalkuli kaj en ambaŭ kazoj havi la bonŝancon. En la “kerno” de tiuj ludrondo krom Nora estas André kaj Masako de Francio, Karin de Germanio, mi de Litovio, ofte venas francino Jannick kaj Helen de Britio. Tiu rondo jam havas proprajn esprimojn, ŝercojn, aludojn, kaj kompreneble, la plej ŝatatan ludon kiu dum la jaroj estas “Leporo kaj erinaco”. (kiu ja ricevis tradukon al Esperanto, fare de Nora.)

En Knajpo ankaŭ ĉe multaj tabloj oni ludas, ofte kartajn ludojn kiujn alportis Rob, sed ankaŭ aliajn: konstruadon de urboj en ĝangalo, Rummikub, aŭ domino. Ludantoj en Knajpo ŝanĝiĝas, iuj foriras, iuj aldoniĝas, sed je la tria horo matene restas la plej “pasiaj”. Temas pri 5-6 personoj kaj estas amuze, ke ĉiuvespere tiu grupeto de belgoj, nederlandano, germanoj kaj litovino planas: “ni ludos hodiaŭ nur ĝis la 3a, ni devas esti saĝaj kaj dormi iom pli...”, sed nome je la tria horo ĉiuj decidas preni ankoraŭ unu trinkaĵon kaj ankoraŭfoje ludi. Neniu sentas sin laca aŭ dormema! Dum tiu malfrua horo, en nokta silento de junulargastejo aperas speciala etoso kaj malgraŭ la regulo, ke kunludantoj estas konkurentoj, ke ĉiu persone devas klopodi por gajni ni eksentas nin pli proksimaj, pli amikaj, pli malfermitaj al diversaj temoj...



Post observo kaj diligenta partopreno en IFaj ludrondoj mi konkludas, ke ludoj por homoj de ĉiuj generacioj konvenas por agrable pasigi tempon, por esti kune al gepatroj kaj infanoj kaj eĉ por instrui la lingvon. Do, venu al IFo kaj aliĝu al nia rondo.

Graĵina Opulskiene

## *In-Spir'*... Originala KD en via kolekto... *Morice Benin* en esperanto !

*Estimataj muzikŝatantoj,*

Ni volas anonci al vi, ke la disko, kiun ni preparis dum la lastaj monatoj de 2001, nun disponeblas!

Temas pri la *KoDisko* de la franca kantisto *Morice Benin*.

La disko aperis oficiale en esperantio dum la unua semajno de januaro. La homoj, kiuj antaŭmendis ĝin, jam ricevis ĝin komence de januaro 2002.

Por la Francoj, la oficiala apero okazis la 15an de februaro, kiam nia distribuanto "*Mosaic Music Distribution*" metis ĝin en la diskmagazenebretojn.

Efektive, Francoj povos aĉeti la diskon en la diskvendejoj (FNAC kaj simile) en la tuta lando! (por ni estas grava evento, kaj gravas ankaŭ sciigi ĉirkaŭ vi la novaĵon, ĉar eblos rimarkigi esperantoproduktaĵon en publika loko !)

La disko estis surbendigita (nur la voĉo de *Morice Benin*) en la studio de *Vinilkosmo* en Donneville, far de nia sonreĝisoro Tribulet'. Jen estas 15 titoloj prezentante kelkajn malnovajn kaj plej plejmulte de la lastaj kantoj de *Morice*...

Vi estos mirigitaj pro la muziko de la vortoj, kiu bonege kunfandiĝas kun la lingvoharmonio de esperanto !

*Morice Benin* estas eksternormeca kantisto, lia potenca kaj ensorĉa voĉo forportas nin en la aŭtentecon de tenera, humura, engaĝita... mesaĝo.

Tiu grandulo de la franca kanzono elektis vojetojn por ekzercadi sian talentan arton, tio klarigas sendube la etan distancon inter lia persono kaj siaj tekstoj.

Tra akustika instrument-inventiva kreaĵo, li distilas por ni tiun "vivo-blovon", kontaĝa kaj kara, eĉ en esperanto.

La verko *In-Spir'* de *Morice Benin* disponeblas en la TTTejo de *Vinilkosmo*: <http://www.vinilkosmo.com> aŭ en viaj kutimaj libroservoj. Esperantistoj en Francio povos akiri ĝin en la diskvendejoj (se ne estas en la breto, petu ĝin el la katalogo de *Mosaic Music Distribution*) aŭ mendu ĝin rekte al ni, sendante al nia poŝtadreso ĉekon de 18 Euroj (€) + 3, 31 Euroj (€) por sendokostoj = 21, 31 Euroj

VINILKOSMO

Esperanto-Muzik-Prod.

F-31450 Donneville = tel: +33 (0)5 61 81 95 65

Dankon al ĉiuj, kiuj subtenis kaj fidis nin, antaŭmendante la diskon; sen ili la projekto ne povintus efektiviĝi !

*Plej muzikajn bondezirojn por la nova jaro 2002 !*

*Floreal Martorell*  
Direktoro de *Vinilkosmo*

## Ĉu la "jaro de la lingvoj" -2001- estis sukcesa por esperanto ?

(Tiu oportunan demandon starigis [anna.ritamaki@kolumbus.fi](mailto:anna.ritamaki@kolumbus.fi) al nia agema samcelano Claude PIRON)...

Anna [...] :

1/ Kiel vi taksas la ĝeneralan sukceson de la lingvojaro ? Ĉu la mesaĝo de la jaro, laŭ la informoj de EU kaj KdE estis klara, kaj ĉu ĝi atingis la ĝeneralan popolon ?

Cl. Piron : Ĝi certe ne atingis la ĝeneralan popolon. Kiam mi jen kaj jen demandis konatojn, ĉu ili scias, ke 2001 estas la eŭropa jaro de la lingvoj, eĉ ne unu tion sciis. En la gazetaro praktike nenio aperis pri ĝi.

2/ Ĉu vi taksas, ke esperanto estis bone traktata dum la lingvojaro ? Kiel en Eŭropo kiel tuto, kaj kiel specife en via lando ?

Estis sufiĉe da mencioj pri esperanto en la internaciaj retaj forumoj, sed neniu oficiala intanco metis la demandon pri internacia komunikado sur seriozan tagordon. Kaj neniu el tiuj, kiuj promesis respondi al la rimarkoj de la civitanoj, tion faris pri la lingva problemo, kvankam multaj kontribuoj temis pri ĝi (kaj pri esperanto).

Kiam esperanto estis traktata, estis plej ofte pozitive, sed ĝenerale ĝi estis komplete ignorata. Tamen, la urbo Namur, en Belgio, organizis tutan semajnon da informado pri esperanto (2001 02 16-25), kun multaj pozitivaj realigoj: konkurso de afiŝoj (la gajninta projekto -kun la vortoj, france, "*renkonte al esperanto*"- estis videbla ĉie en la urbo), belega, moderna ekspozicio en la Kultura Domo, aperigo de tuta dosiero pri esperanto en revuo por lernejoj, dulingva deklamo de poemoj, kantado -belega- fare de Nikolin', debato pri lingvaj problemoj kaj esperanto, en kiu ĉiu el la kvin partoprenantoj, universitataj profesoroj, escepte de unu, montriĝis tre favora al nia lingvo (fakte, eĉ la kontraŭulo estis mola en sia kritikado), kaj fine, sed por mi ege grava, invito al mi prelegi. La urbo pagis al mi la vojaĝon kaj restadon. Mi kredas, ke unuafoje en mia vivo, mi iris prezenti esperanton pagote de publika instanco. La salono, en kiu okazis la diversaj aranĝoj, estis ĉiam plenplena, kaj kiam mi vizitis la ekspozicion, estis vere multege da rigardantoj.

3/ Kiel vi taksas la involviĝon de la esperantistoj en la lingvojaro ? Menciui iun sukcesan ekzemplon kaj menciui kelkajn niajn ĉefajn problemojn aŭ malfortojn. Menciui ion pri via propra involviĝo aŭ neinvoviĝo.

Niaj ĉefaj problemoj fontas el la malfacileco interesi la amaskomunikilojn. Ankaŭ komprenigi al ni mem kaj al la publiko la problemon, kiun eblus nomi "la informa iluzio" Ĉar homoj rigardas televidon kaj legas gazetojn, ili imagas, ke ili estas informataj pri ĉio, kio "vere", "serioze" ekzistas. Sed tio estas iluzio. La informado dependas de la intereso, antaŭjuĝoj kaj preferoj de la ĉefredaktoroj aŭ programrespondeculoj, aŭ de tiuj, kiuj financas ilin. Pensu, ke, kvankam estas esperantistoj en grandega nombro da urboj en la mondo, la ĝenerala publiko eĉ ne scias, ke tiu lingvo ekzistas! Tio, kion ni nomas informado (inkluzive de la lerneja) tute ne spegulas la realon.

Inter la sukcesaj ekzemploj indas citi *Euroscola*. Ankaŭ la *IJK* en Strasburgo sufiĉe bone informis pri nia ekzisto. Kiel en Namur, ankaŭ tie estis afiŝoj en la tuta urbo. Alia relative sukcesa evento estis la prelego pri esperanto en Ĝeneva Universitato, aranĝita la 26-an de septembro de la loka grupo, kun la titolo "*La vero pri esperanto*". Post ĝi, 15 personoj aliĝis al la kurso kaj 13 plu fidele vizitadas ĝin nun. En Svislando, prelego pri esperanto okazis (2001 - 10.30) ankaŭ en la Federacia Politeknika Lernejo Lauzana (tre bonreputacia institucio, fama en sciencaj kaj inĝenieraj medioj), kaj tie kreiĝis esperanto-klubeto. Gvidas la kurson hungardevena Stefano Keller. Alia menciindaĵo miaopinie estas la internacia kolokvo organizita de la Goethe-Instituto en Bordeaux (2001 - 03.03) pri "*Ĉu Eŭropo morgaŭ parolos angle ?*" (la Aktoj de la kolokvo ĵus aperis ĉe L'Harmattan en Parizo, redaktitaj de Robert Chaudenson). Tie mi devis pritrakti la temon "*Trilingva Eŭropo, ĉu realisma espero ?*". Mi diris, ke la sola realisma trilingvismo estas tiu kun la gepatra lingvo, esperanto, kaj parta regado de alia lingvo. La debato, kiu sekvis, estis preskaŭ ekskluzive dediĉita al esperanto.

Manifestiĝis akra, vigla kaj ne honesta kritikado fare de du profesoroj pri lingvistiko, kiuj esprimis la ĉiamajn antaŭjuĝojn ("esperanto ne povas funkcii, ĉar ĝi ne estas lingvo"), sed dank'al Robert Philipson (la aŭtoro de *Linguistic Imperialism*), ankaŭ kiu ĉeestis, la lasta vorto estis favora al esperanto.

Pardonu, se mi tro babilas, sed tio, kion mi nun rakontas, ne okazus, se ne organiziĝus la Jaro de la Lingvoj. En Bordeaux unu el tiuj francaj lingvistoj, kiam oni prezentis min al li, diris : "Ha ! Vi estas Piron ! Vi estas la aŭtoro de "*Le défi des langues*" ! Rimarkinda libro ! Tre bone dokumentita kaj inteligente prezentata. Mi legis la unuan duonon. Sed kiam mi atingis la vorton "esperanto", mi sciis, ke ne plu interesos min, mi do ĉesis legi".

Ripensinde, ĉu ne?

4/ Kiuj estas viaj finaj impresoj? Kio restis de la jaro ? Ĉu ion nova alvenis kun ĝi ? Kion ni povus eluzi estonte, kion ni lernis?

Mi dubas, ĉu io nova alvenis kun ĝi. Eble tamen "Euroscola" impresis kelkajn junulojn, kaj el tio restos io. Kion mi lernis, tio estas, ke la nekompreneo pri la lingvaj problemoj estas giganta. Mi lernis faktojn pri la nekredebla investado de kelkaj landoj en la disvastigon de sia lingvo. Ekzemple, ke Francio elspezas ĉiujare miliardon da usonaj dolaroj por la disvastigo de la franca (estus interese scii, ĉu la francaj impostpagantoj tion konscias kaj akceptas), kaj Germanio 500 milionojn da DM por la germana. Kaj ŝajnas al mi, ke tiuj apenaŭ pli sukcesas krei verajn uzantojn de la respektivaj lingvoj ol e-istoj pri esperanto..

Claude PIRON



... el la "urbo de la bildoj" \*\*\* ===== ☆

## *Se Manette Bernardin ne estus, ŝin ni bezonus inventi !*

Imagu la ejon kaj la ulojn. Noktis kaj frostis ekstere. Tricent homoj minimume kunvenis ene de vastega ĉambro de la Epinala Ekspozicidomo. Tiun vesperon ĉeestis la plej aktivaj anoj de la diversaj asocioj de la urbo, kiuj partoprenis en la "asocia-semajno", organizita de la estraro, por honori la centjar-jubileon de la « 1901-a leĝo » pri la asocioj.

Jen la lasta vespero ; ĉiuj estis bonvestitaj, kiel por gravaj eventoj. Komence, la urbestro oratoretis, kaj poste profesiaj aktoroj ludis teatraĵon. Finfine ni sekvis la aliajn, kiuj babilante rapidis ĝis la bufedo, prizorgita de la asocio nomata "La amikoj de la sano"... Bufedo sen alkoholaĵoj kompreneble.

Ĉi-tie komenciĝas la « aventuro »...

Dum la pasinta semajno, Manette jesis la proponon de la direktoro de la evento : « Ĉu la esperantofonoj konsentas kanti dum la honora bufedo ? »...

Imagu: nur Manette kapablas kanti bele. La ceteraj ne kutimas, kaj mi persone tre malbone kantas... Kaj por ke estu malpli facile, nur kvin esperantistoj ĉeestis tiun vesperon! Tricent seriozaj homoj, kvin frenezuloj... kunkantante esperantlingve! Mi aldonu, ke ni trejniis nur unu fojon dum la semajno!

Feliĉe, ni antaŭsciis, ke ĥoro partoprenus. Fakte neniu el ni jam konis iun ulon el tiu ĥoro, kaj neniu zorgis priprezenti nin. Do, ni serĉis, glaso en mano, iujn ĥoranojn. Kiel Indianoj, ni aŭskultis atente. Horanoj kutimas kanti ĉu ne ? Nu, ni malfermu la orelojn...

« Rigardu... Tiu homo tenas muzikpaperon.... Li estas eble unu el la ĥoranoj !... »

- Demandu al li !...

- Kial mi, demandu vi !... »

Subite, meze de la bruo, ekis kanto... Ni proksimiĝis kiel serpentoj, inter homoj, glasoj, kukoj... Efektive, grupo bele kantis... kaj temis pri 40 partoprenantoj !

Jen Manette, unu metron sesdek proksimume granda, kiu atendas la finon de la kanzono kaj tuj prezentas sin je la ĥorestrino. Jes... ŝi jam scias, ke grupo da esperantofonoj deziras kanti kun ili esperantlingve... Afable akceptis la ĥoranoj legi la koncernatan tekston kaj aŭskultis Manette kanti. Sed ŝajne dubis la estrino pri nia prezentado... « Tro bruas, neniu aŭdos vin, ĉar via kanto temas pri ekdormigo de infanoj !... ». Jes, ŝi pravas, ni ja elektis « Dormu milde », tre belan lulkantaton verkitan de Marcel Redoulez.

Nu, tuj mi rimarkis mikrofonojn sur la scenejo ? Rapide mi klopodis malkovri la direktoron, cele ricevi permeson uzi la ilojn. Kie do li povas stari ? Mi denove serpentumis, starigis demandon kelkloke... Finfine, tute hazarde, mi trafas lin. Mian peton li ne tute komprenis, nur post kelkaj minutoj da miskompreno meze de bruo, li klarigis : « Tiuj mikrofonoj ne estas niaj, ili apartenas al privata asocio por morgaŭa koncerto... ». Kvazaŭ falegas la mondo ĉirkaŭ mi !... Ĉu finfine ni ne kantas ? Ne, ne... ne gravas... Ni kantas !

Mi reiris al nia grupo. Manette multe dubis. La problemon ŝi eĉ klarigis al la urbestro... Preterpaŝinte ŝi legis al li nian kanzonon... Li ŝatis, sed ne havis solvon por ni ! Manette eknervoziĝis. Jen la ĥoro, kiu rekantas... Ŝin mi instigis interveni... "Post tiu kanzono, ne atendu... Iru al la gvidantino kaj kantigu la homojn!"...

Okazis la miraklo: kvardek ĥoranoj plus kvin esperantofonoj obeis la "Majstrinon Manette"! Ĉiujn versojn de la teksto, unu post la alia, ŝi instruis al la koncernatoj... Kaj ni kantis !... Verdire « ili » kantis... mi nur provis !

Nun divenu la plej belan novaĵon !... Nian kanzonon komprenis la tuta grupo kaj ĉiuj eldiris, ke « esperanto estas ja facila lingvo ! »... Nekredeble, ĉu ne ?

Manette plukantigis en esperanto la ĥoron, kaj sekve pli bone konatiĝis la du grupoj !

**Eble kuŝas tie la vera miraklo : Esperanto proksimigas la homojn !**

*Emmanuel. Dankon al Florence por la tajpado.*

\*\*\* EPINAL (F-88000) famiĝas interalie pro ateliero kun tre malnova tekniko de bild-ellaborado, parte mane... La muzeo -kaj la ateliero !- indas je pli ol interesiga vizito.



pour vous initier à la seule  
vraie langue  
internationale, pour vous perfectionner  
ou éprouver le plaisir rare de converser  
en espéranto...



➔ **nos stages, nos congrès,  
nos rencontres, nos voyages...**

"La Informilo" ne kapablas informi pri ĉiuj esperanto-eventoj okazontaj "iam" kaj "ie"!... Niaj legantoj bonvolu esplori fakajn gazetojn aŭ magazinojn, kiujn ili havas oportune submane!

## 75-a KONGRESO de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda)

ALICANTE Hispanio

01/07 – 07 - 2002-03-24

<http://membres.lycos.fr/satesperanto/kongresoj/kongreso2002/Alicante2002.html>



28a Internacia Semajno de Esperanto - 24/31 - 08

Maison Familiale « Le Lazaret »

La Corniche

34200 F – SETE

*inter maro kaj lagoj  
niaj pasiaĵoj interdonigu*

<http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html>


Someraj Staĝoj

Maison Culturelle de l'Espéranto

Château de Grésillon

BAUGE F – 49150

<http://greziliono.kastelo.free/staghoj.htm>



... sur votre agenda ...  
**52<sup>ème</sup> stage d'espéranto parlé**  
organisé par  
l'Association Espéranto France-Est  
**VILLERS-lès-NANCY = 18/20 octobre 2002**  
(toute documentation utile dans " LA INFORMILO " 118 - juin 2002)

# Congrès 2002 de l'espéranto en France

Strasbourg • 17-20 mai

Interasocia kongreso  
STRASBURGO  
17-20 majo 2002

**Strasburgo**, intelekta, arta kaj ekonomia ĉefurbo de Alzaco havas amplekson, etoson kaj allogpovon de ĉefurbo sen havi ties troecon. Estas urbo kiun oni neniam lacigas revidi, car ĝi ĉiam havas ion novan kaj esencan por diri.

Kaj ĝuste tie **Espéranto-France**, **Espéranto-France-Est** kune kun **Espéranto-Jeunes**, **FET** (laboristoj), **GEE** (instruistoj), **FKEA** (katolikoj) kongresos je pentekosto 2002

La kongreso komenciĝos je la 15-a horo, vendredon la 17-an de majo kaj finiĝos la 21-an de majo per tutaga ekskurso. La ĉefaj eroj de la kongreso okazos en "Fossé des Treize", rue du Fossé des Treize.

Diversaj programeroj de *Espéranto-Jeunes* okazos en Junulargastejo "René Cassin".

### Turisma programo

Malkovro de Strasburgo, vizito de bierfarejo, vizito de potista vilaĝo Betschdorf, kaj marde tuttaga ekskurso al fama kastelo Haut-Koenigsbourg kaj vizito de Colmar.

### Vesperprogramo

Bonveniga vespero, interkonatiga bufedo, prezento de partoprenantaj asocioj kaj laborgrupoj, Koncerto de Mòrice BENIN, bankedo en tipa restoracio.

### Prelegoj

Prelego de Georges KERSAUDY, aŭtoro de "Langues sans frontières" kaj pluraj aliaj prelegoj interalie pri Alzaco.

### Oficialaj kunvenoj

de diversaj asocioj komitatkunsidoj kaj Membrokunveno de Espéranto-France, membrokunvenoj de Espéranto-Jeunes, GEE, FET kaj FKEA.

### Aktivulaj laborgrupoj :

Komisiono pri eksteraj rilatoj, Informado, KD-romo, Interreto.

### Resendu la dokumenton al

TAKE, s-ro André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM  
kun pago per franca ĉeko aŭ ĝiro al PCK 2 429 78 S Strasbourg (je la nomo de TAKE)  
kun pago per germana ĉeko aŭ ĝiro al Postbank 3393 48-758 BLZ 660 100 75 Karlsruhe

Pli da informoj ĉe [www.esperanto-france.org](http://www.esperanto-france.org)

## ALIĜILO

Congrès 2002 de  
l'espéranto en France  
Strasbourg • 17-20 mai

Familia nomo : ..... Persona nomo : .....  
Adreso : .....  
Postkodo, urbo kaj lando : .....  
Tel : ..... Faksno : .....  
Retadreso : .....  
Sekso :  ina  malina ..... Naskiĝdato : ...../...../..... Vegetaran-in-o :  ne  jes

La aliĝo entenas la jenon : aliĝo al la kongreso, al ĉiuj laborgrupoj kaj prelegoj, al la interkonatiga bufedeto kaj al la koncerto de Mòrice Bénin. Ĝi inkluzivas nek loĝadon, nek manĝojn, nek turismajn programerojn :

Mi membras en unu el la partoprenantaj asocioj : ..... (nomo de la asocio)

### Kotizo por

- |   |                    |   |
|---|--------------------|---|
| <input type="checkbox"/> Plenkreskuloj                | 40 / 50 € = .....  | € |
| <input type="checkbox"/> Subtenantoj                  | 80 / 100 € = ..... | € |
| <input type="checkbox"/> Eksterlandanoj               | - 10 € = .....     | € |
| <input type="checkbox"/> Mi malpli ol 30 jaraĝas      | - 10 € = .....     | € |
| <input type="checkbox"/> Mi aliĝas post la 2002-04-30 | + 10 € = .....     | € |
| <input type="checkbox"/> Mi malpli ol 18 jaraĝas      | senpage            |   |

Sume : .....€

Mi veturos el.....(urbo)  
kaj proponas .....loko(j)n en mia veturilo

Dato kaj horo de alveno : .....  
kaj de foriro : .....

Dato kaj subskribo :



**Congrès 2002 de l'Espèranta en France**  
Strasbourg - 17 - 20 mai

# **Ekskursoj Turismado Bankedo**

**Interasocia kongreso STRASBURGO**  
17-20 majo 2002

**Sabate matene de la 10a45 ĝis la 12a grupe kaj trame -> 3 euroj**



Vizito de la bierfarejo „**KRONENBOURG**“ kun kompreneble „biergustumado“

**Lunde posttagmeze de la 14a ĝis la 18a per propra aŭtomobilo, sen koste BETSCHDORF**




En Betschdorf, vi malkovros ĉarman kaj tipan alzacan vilaĝon. Tiu vilaĝo iĝis famkonata dank'al potistoj: bluaj/grizaj potoj de Betschdorf


Vizitante potfarejon kun Sinjoro Schmitter, kiu klarigos al vi sian arton, vi certe trovos ion por donaci !!!

Kompreneble Odet', la avineto de la orienta federacio atendas vin !

**Sabate de la 16a ĝis la 18a kaj dimanĉe de la 14a ĝis 16a) katedralo+kvartalo : 3 euroj**



**Lunde de la 14a ĝis la 16a tipaj kvartaloj : 3 euroj**





Memevidente, ĉiutage eblos viziti la katedralon kaj katedral-kvartalon (eĉ sekvante la spurojn de la unuaj bierfaristoj !) aŭ la tiel nomatan kvartalon "Eta Francio" kun Catherine Gallego

*l'Ancienne Douane*  
Restaurant - Brasserie

**Dimanĉe vespere : Bankedo en tipa alzaca restoracio ĉe la rivero Ill, proksime de la katedralo " La Malnova Dogano " : 25 euroj**



**Marde : tuttaga ekskurso** (de la 9a ĝis la 20a) buse  
 → **40 euroj** : eblas nur ekde 30 partoprenantoj  
 entenas la bus-koston, la enirbiletojn en la muzeo kaj  
 kastelo kaj la tagmanĝon en restoracio en " Colmar "



**Matene : la fortikaĵo " Haut-Koenigsbourg "**

Ni kune malkovros tiun fortreson, kie Jean Gabin parte rolis en la filmo  
 " la granda iluzio "

Ni provos pli bone koni la evoluon de la fortikaĵoj, la historion de la kas-  
 telo (de la " Hohenstaufen " al la Imperiestro Vilhelmo la 2a). Loĝado de  
 rabistoj, detruita de la svedoj dum la 17a jarcento, ruinigita kaj rekons-  
 truita, ĝi ebligas al vi interesan vojaĝon tra la tempoj.




Promenado en la tielnomata "Eta  
 Venecio" por nia plezuro !!!

**Posttagmeze : Colmar**

Patrio de la famkonata Hansi !!

Vizito de la Muzeo " Unterlinden ", kies kolektoj estas  
 famkonataj, ĉefe la diversaj verkoj de la Mezepoko kaj de la  
 Renesanco. Tiu muzeo estas asocia bieno (menciinda)

Bieno "Pfister"  
 (16a jarcento)



Multaj vizitantoj  
 venas ĉefe por la  
 altar-tabulo de  
 " Issenheim "

## REZERVILLO

Rezervu viajn ekskusojn kaj la bankedon :  
 Nomoj kaj adreso:

-----  
 -----  
 -----  
 -----

Sendu ĉi-tiun rezervilon kaj ĉekon **je la nomo**  
**de:**

**TAKE CCP 2 429 78 S Strasbourg**

**al**

André Grossmann  
 5, rue des Pyrénées  
 68390 BALDERSHEIM,  
 Francio

Congrès 2002 de  
 l'Espéranto en France  
 Strasbourg - 17-20 mai

Ekskurso aŭ bankedo	Kosto:	Nombro da personoj	Sumo
Bierfarejo	3 €		
Betschdorf	senpaga		
Katedralo sabate	3 €		
Katedralo dimanĉe	3 €		
Tipaj kvartaloj	3 €		
Tuttaga ekskurso	40 €		
Bankedo dimanĉe vespere	25 €		
Vegeterano			
		Sumo:	

# Loĝado - Atingeblecoj - Mapoj

Eblas loĝi en la proksimeco de la kongresejo:

**Ciarus** situas en la centro de Strasburgo en la sama strato kaj nur je kelkaj metroj de la kongresejo. La urbo-centro atingeblas de tie piede, buse aŭ trame.

**Kiel atingi Ciarus kaj la kongresejon ?**

**Trajne :**

Place de la gare, fronte al Hôtel des Vosges, uzu la bus-linion 10 direkto "Brant Université" kaj eliru je 3a haltejo "Place de Pierre".

**Aŭtostrate:**

El Haguenau, elirejo "Place de Haguenau" kaj selvu la panelojn "Ciarus".

El Colmar/Mulhuse, elirejo "Wacken", direkto "avenue des Vosges" kaj sekvu la panelojn "Ciarus".

El Parizo, elirejo "place de Haguenau" kaj selvu la panelojn "Ciarus".

**Aviadile:**

Estas buso de flughaveno "Entzheim" ĝis stacidomo "Baggersee". De tie uzu tramon ĝi stacio "Place des Halles".

L'accès au Ciarus

**Par le train:**

Place de la gare, devant l'hôtel des Vosges, emprunter les lignes de bus 10 direction "Brant Université" et descendre au 3ème arrêt "Place de Pierre".

**Par avion:**


Un bus vous conduit depuis l'aéroport d'Entzheim jusqu'à la station "Baggersee". De là prendre le tram jusqu'à la station "Place des Halles".

**Par l'autoroute:**

En venant de Haguenau, prendre sortie "Place de Haguenau" et suivre les panneaux de signalisation "Ciarus".

En venant de Colmar/Mulhouse, prendre sortie "Wacken", direction "avenue des Vosges" et suivre les panneaux de signalisation "Ciarus". En venant de Paris, prendre sortie place de Haguenau et suivre les panneaux de signalisation "Ciarus".

**L'ensemble du Ciarus est accessible aux personnes à mobilité réduite .**



Le Ciarus est situé au coeur de la ville 7, rue Finkmatt - 67000 Strasbourg


**Le stationnement**

**En voiture :** Le Ciarus dispose de quelques places de parking gratuites. L'accès se fait par l'entrée arrière du Ciarus : rue du fossé des 13.

**Le parking n'est pas gardé.**

**A vélo :** Le Ciarus dispose d'un parking souterrain, où les vélos peuvent être stationnés.

Le parking n'est pas gardé



## BAVELO

Baden-Virtemberga  
Esperanto-ligoBaden-Virtemberga  
Esperanto-tago 2002Sabato, 27-a de  
aprilo 2002 en  
Konstanco

Sabato, 27-a de aprilo 2002 en Konstanco

## Programo

## Vendredo, 26a de Aprilo 2002

18:30 Alveno de malproksimaj gastoj; komuna vespermanĝo, interkona vespero. Loko: Vintrinkejo "Bürgertröpfle", Hüetlinstr. 13 (apud Bodanplaco, proksime al la ĉefa stacidomo; per aŭto: plej proksima parkejo "Döbele") => plano pri la situo

## Sabato, 27a de Aprilo 2002

10:00 Salutvortoj de reprezentantoj de la urbo Konstanco, prezidantino de Bavelo, loka grupo Konstanca  
10:30 Prelegoj en Esperanto: Mondlingvo Volapuko, badenaj legendoj

12:00 Komuna tagmanĝo (vegetara kaj ne-vegetara menuo por elekti)  
14:00 Ĉiĉeronado tra la 2000-jara historia urbocentro de Konstanco en Esperanto

16:00 Bavelo-Jarĉefkunveno 2002. Gastoj estas kore bonvenaj

18:00 Esperanto-Diservo en la katedralo Sankta Maria en Konstanco (Pastro Eichkorn)

19:30 Forveturo aŭ komuna Esperanto-vespero (sen limo)

20:00 Armena folkloro

**Dimanĉo, 28a de Aprilo 2002** Matene: komuna ekskurso per ŝipo al la florinsulo Mainau [majnaŭ]



Kolpinghaus  
Hofhalde 10a /  
Kolpingweg  
78462 Konstanco

Alveturo:  
sur ĉefa strato en direkto  
centro / ĉefa stacidomo,  
poste al Fischmarkt

## Aliĝilo

Mi partoprenos kun .....personoj kaj venos .....per aŭto.   
(Disponebias nur malmultaj parkejoj, do alveno per trajno per trajno.   
rekamendindas.)

Persona nomo .....Familia nomo .....

Adreso.....

Telefono .....Retpoŝto .....

Tagmanĝo (ĉe sufiĉaj mendoj) .....vegetara jes  ne

Tranokto (18 Euroj po tranokto 26./27.04.  27./28.04.   
kun matenmanĝo)

Mi deziras partopreni la ekskurson al la florinsulo Mainau je la 28a de aprilo 2002

Dato ..... Subskribo .....

Bonvolu resendi ĝis 10.04.02 al: Thomas Schütz, Eierstr. 12, DE-70199 Stuttgart  
aŭ retroŝte al: Thomas.Schuetz.Stuttgart@t-online.de





La Internaciaj Renkontiĝoj de Pluezek, urbeto de Bretonio (en Francio), iĝis pli kaj pli grava evento en Esperantio. Okaze de la kvina Pluezeka Renkontiĝo en aŭgusto 2001, jam estis pli ol 170 partoprenantoj el 11 landoj, kaj tiu partoprenantaro ĉiujare plimultiĝas !

La programo de la Pluezekaj Renkontiĝoj estas ja riĉa. Matene, okazas Esperanto-kursoj por ĉiuj niveloj, kun spertaj instruistoj el diversaj landoj. Vi povos elekti inter 4 niveloj, kaj estos eĉ kurso por instruistoj. Por la infanoj, estos 2 kursaj niveloj.

Posttagmeze, multaj distraĵoj estas proponataj : turismumado en tiu belega regiono Bretonio, danco, ĥorkanto, joko, teatro, Interreto... kaj eble eĉ kurso pri la bretona lingvo!...

Ĉiuvespere, estas antaŭvidata "kabaredo" kun kulturaj eventoj : bretonaj dancoj, prelegoj, maristaj kantoj, kabared-teatro, ktp. Ĉiuj proponoj bonvenas. Tia kabaredo estos interesa animaĵo, ĉefe por la junuloj, kiuj povos tiel festumi dum la tuta vespero !

Je la fino de la staĝo, la plej laboremaj povos trapasi Esperanto-ekzamenojn (1-a aŭ 2-a nivelo). Estas bona okazo por mezuri sian Esperanto-nivelon.

Do, nepre partoprenu la venontan Pluezek-Renkontiĝon por malkovri tiun ĉarman bretonan urbeton tre proksiman de tiu de *Obeliks* kaj *Asteriks*, por amuziĝi, por plibonigi vian Esperanto-nivelon, por trapasi ekzamenojn, por partopreni simpatiajn vesperojn kun bonaj amikoj... Tiom da kialoj por partoprenigi vin al tiu agrabla renkontiĝo, kiu okazos de la 17- ĝis la 24-a de aŭgusto 2002 !

Se vi deziras pliajn informojn, aŭ jam aliĝilon, vizitu la jenan ttt-ejon :  
[http://perso.wanadoo.fr/22.esperanto/Esperanto\\_a\\_Plouezec.htm](http://perso.wanadoo.fr/22.esperanto/Esperanto_a_Plouezec.htm)  
aŭ kontaktu S-inon **Louise RIGEAULT**, 4 route de Kervor, 22470 PLOUEZEC  
tel: +33 (0)2 96 22 70 13 - [esperanto.22@libertysurf.fr](mailto:esperanto.22@libertysurf.fr)

Sébastien ERHARD



## 10a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo Cambrils (Tarragona) Katalunio. Hispanio 19/26 - 10 - 2002

Pli ol riĉa, multfaceta programo, kiu kuŝas en **alloga kolor-dokumento**, kiun vi povas peti ĉe

S-ro Santiago Torné  
Apartat 423. 08200 SABADELL Hispanio  
937253421 937275021  
fakso 937314111  
[luis\\_serrano@e-milio.com](mailto:luis_serrano@e-milio.com)

... Karaj samideanoj, se vi deziras ripozi en Esperantio, jen tre adekvata loko. En ĉi tiu zono de la Mediteranea Maro, dum la tuta jaro loĝas miloj da eksterlandanoj pro la favoraj prezoj kaj ŝatata klimato. Venu ĝui ĉi tiun Esperantan familian etoson, kiu ĉiam ekzistas en niaj "semajnoj", post la grandaj brujoj de la internaciaj multnombraj Esperanto-aranĝoj!..

...al eventualaj helpantoj ...



Eldonejo Christian BERTIN pretigis provizoran eldonon de fakvortaroj francaj-esperantaj pri :

- *aviado, aerospaco kaj aerostatiko*

- *kino/televideo, muziko kaj sporto/ludo*

kaj serĉas franclingvajn esperantistojn por kontrolado.

Bonvolu kontakti :

Christian BERTIN  
6, rue de la Fresnerie 35510 CESSON-SEVIGNE Francio  
[christian.bertin@voila.fr](mailto:christian.bertin@voila.fr)





m/ni aliĝas al la 19-a IF  
 Borken (27 dec 2002 - 3 jan 2003)

nomo familia: \_\_\_\_\_  
 nomo persona: \_\_\_\_\_  
 naskiĝdato: \_\_\_\_\_

pliaj personoj: (el la familio, se necese kun familia nomo)

2: \_\_\_\_\_  
 3: \_\_\_\_\_  
 4: \_\_\_\_\_  
 5: \_\_\_\_\_

adreso/strato: \_\_\_\_\_  
 poŝtkodo/urbo: \_\_\_\_\_  
 lando: \_\_\_\_\_  
 tel.: \_\_\_\_\_  
 reĵoŝto: \_\_\_\_\_

**ĉiuj antaŭpagoj** kotizo/-parto: \_\_\_\_\_  
 + ekskurso: + unufla ĉ.: + fonduso: \_\_\_\_\_  
 al konto: \_\_\_\_\_  
 entute [ ] \_\_\_\_\_  
 EUR, alta valuto

ne plenigu 1-2-3-4-5-6-7-8-9-10-11-12-13-14-15-16-17-18-19  
 al r. \_\_\_\_\_  
 ap r. \_\_\_\_\_  
 ak.s. \_\_\_\_\_  
 2a s. \_\_\_\_\_  
 3a s. \_\_\_\_\_

## KOTIZOJ 19-A IF

en EUR / eŭroj

